



# Beletra Almanako

N-ro 20 (Junio 2014) – 8a jaro

ISBN 9781595692801 / ISSN 1937-3325

Bildoj: Max Elbo



**Kontribuis:** F. Albert Reyna, J. Amouroux, T. Auderskaja, G. Berveling, M. Bronštejn, E. By'elongo Isheloke, J. Camacho, G. Cappa, R. Cash, T. Chmielik, R. Dumain, I. Ertl, M. Fernández, F. Fonseca, G. Greatrex, P. Gubbins, S. Johansson, C. Krause, S. Laine, L. Ligęza, K. Long, B. Markó, C. Minnaja, S. Moinhos, J. E. Nagy, Nitta T., R. Potturu, B. Ragnarsson, N. Rašić, N. Ruggiero, P. Sanz, W. Szymborska, H. Tonkin, R. Torrens, Učimura K., A. Valén, V. Woolf

**MONDIAL NOVJORKO**

[www.librejo.com](http://www.librejo.com)

# Enhavo


<b>Prezento</b> .....	3
<b>Originala prozo</b> .....	5
Elisée By'elongo Isheloke: <i>El La onta mondo</i> .....	6
Mikaelo Bronŝtejn: <i>Eksorto tria: Talis</i> .....	10
<b>Originala poezio</b> .....	17
Baldur Ragnarsson: <i>Kvar poemoj (La rozo; Ĉu venis la tempo?; La magia ŝtono; Salrezistaj herboj)</i> .....	18
Gerrit Berveling: <i>Kvar poemoj (Kato ne duŝas sin; Pri mirakloj; Odo al Kerry; Kompato al iama instruisto)</i> .....	20
Giulio Cappa: <i>Marĝene al la eseo Motivoj por (ne) kabei de Jorge Camacho</i> ...	23
Suso Moinhos: <i>Paĉjo; Al la senmembra satiruso kaptita en la sicilia markolo, preskaŭ ĉeorele</i> .....	27
Siru Laine: <i>Fino</i> .....	29
Nicola Ruggiero: <i>La korva plumo</i> .....	30
<b>Tradukita prozo</b> .....	32
Virginia Woolf: <i>La ĝardeno de Kew</i> (trad. Sten Johansson) .....	33
Virginia Woolf: <i>La korda kvarteto</i> (trad. Sten Johansson) .....	38
<b>Tradukita poezio</b> .....	42
Rosmari Torrens: <i>Poemoj (Konfetoj; Per lunoj kaj pikiloj, kaj fiŝoj; Vana batalo; trad. Miguel Fernández)</i> .....	43
Wisława Szymborska: <i>Poemoj (Raporto el hospitalo; Alflugo; Eble ĉio ĉi; Pri la morto sen troigo; La unua foto de Hitler; Fino kaj komenco; diversaj tradukintoj)</i> .....	45
Béla Markó: <i>Du poemoj (Arto poetika; Arto poetika ĉiela; trad. Jozefo E. Nagy)</i> .....	51
Uĉimura Kanzoo: <i>Spros'en frosto</i> (trad. Nitta Takamichi).....	53
<b>Artikoloj kaj eseoj</b> .....	54
Paul Gubbins: <i>Marjorie Boulton 90-jara</i> .....	55
Humphrey Tonkin: <i>Marjorie Boulton, poeto kore fajra</i> .....	56

Miguel Fernández: <i>Memore al Juan Régulo Pérez</i> .....	67
Flávio Fonseca: <i>Mia kontakto kun Geraldo Mattos</i> .....	71
Jean Amouroux: <i>Koboldajoj</i> .....	72
Carlo Minnaja: <i>Ranoj, civitanoj kaj samideanoj</i> .....	84
Geoffrey Greatrex: <i>Esperanto kaj la Malfrua Antikvo</i> .....	94
Ralph Dumain: <i>Borges kaj mi: La sekreta miraklo</i> .....	96
<b>Originala teatro</b> .....	102
Rikardo Cash: <i>La grandioza kongreso</i> .....	103
<b>Recenzoj</b> .....	115
Nikola Rašić pri <i>En la profundo</i> (de Jorge Camacho) .....	116
Antonio Valén pri <i>Pri homoj kaj verkoj. Eseoj pri la Esperanto-kulturo</i> (de pluraj aŭtoroj) .....	124
Tatjana Auderskaja pri <i>Talismanoj. Don Quijote kaj Verdaj Donkiĥotoj</i> (de Abel Montagut) .....	128
Geoffrey Greatrex pri <i>Antologio Latina, volumo 5, Frua Kristanismo</i> (de Gerrit Berveling) .....	129
Sten Johansson pri <i>Morto de artisto</i> (de Anna Löwenstein) .....	134
Pedro Sanz pri <i>Ĉu kultura integriĝo en Eŭropo? Jes, sed nur per demokratia simbiozo de la kulturoj</i> (de Jiří Laube) .....	139
Ranganayakulu Potturu pri <i>Kiel la homo ekis pensi. Eseoj pri la helena filozofio</i> (de Nikolao Gudskov) .....	140
Jorge Camacho pri <i>Ĝhoj el Bembujo</i> (de Elisée By'elongo Isheloke) .....	143
Catherine Krause pri <i>Ĉu mi malgrandas?</i> (de Phillip Winterberg kaj Nadja Wichmann, trad. Alejandro Escobedo) .....	145
Felipe Albert Reyna pri <i>Foreign languages, what they don't often tell you: A book about languages</i> (de Nicole Else) .....	146
Jorge Camacho pri <i>Kiel verki hajkon en Esperanto</i> (de Hiroataka Masaaki) .....	148

\* \* \*

La bildoj sur la rubrik-paĝoj 5, 17, 32, 42, 54, 102 kaj 115, same kiel  
la titolpaĝa pentraĵo, estas kreitaj de **Max Elbo**.

Originala prozo



Julio Baghy

Elisée By'elongo Isheloke

**El La onta mondo**

Pro la misfaroj de la homaro la mondo difektiĝis, malsaniĝis kaj doloris tiel akre kaj tiel forte ke ĝia loĝantaro eksentis fajran varmegon. Neniu plu festis, neniu plu pensadis krom por trovi eblon foriri al alia planedo. Astronaŭtoj anoncis, ke eblas vivi sur Marso, sed ne havis solvon pri la maniero tion fari. Kiam Neil Armstrong kun la *Apollo*'j vizitis Marson, ili raportis al la homaro. Plurajn jarojn poste, alia teamo aventuris tie. Inter ili, kelkaj homoj marŝis sur la Luno, tiel malrapide kaj dolorete kiel homo marŝus sur akraĵoj. Ili tamen tuj raportis al la homaro ke eblas vivi sur Marso kaj la Luno. La provo pri sukceso daŭris. Sciencistoj investis en esplorojn kaj esplorojn sed vane! Ju pli ili laboradis trovi solvon, des pli la mondo varmiĝis. Riveroj sekiĝis, la popoloj malsatiĝis, okazis bataloj inter la familioj pro la malsato, pro la malsano, inkluzive de aidoso, kun timo de Ebola-epidemia, kaj ĉefe pro la malamo. Etuloj batalis kontraŭ granduloj, virinoj kontraŭ viroj, bestoj kontraŭ la homoj, nepagipovuloj kontraŭ riĉuloj, ateistoj kontraŭ kredantoj – estis ĝenerala konflikto, ĝenerala ĥaoso!

Tiam religiestro venis anonci alternativon al Marso, la ĉielon. Homoj povus vivi en paradizo se ili nur plenumus kondiĉojn, se ili agus laŭ specifaj kriterioj, diris religiestroj. La problemo estas ke ili ne estis komprenitaj, unue ĉar ili parolis en siaj spirita lingvoj, kiujn ordinaraj homoj ne komprenis. Ili disaŭdigis ke estas nur unu ŝipo por alvojaĝi tiun mondon, transvojaĝi al la ĉielo, tio estas la amego. Ŝipo ne fizika, ne videbla per la okuloj, tamen kies ondojn sur la akvoj ĉiu vidas; la bruoj de la ŝipo estas efikaj kaj realaj kiel fruktoj tuŝeblaj kaj senteblaj. Religianoj pensis, ke la mondo, la vivo kaj la kredo estas kiel vagono de trajno, kiun la lokomotivestro stiras antaŭen laŭvole kvazaŭ por savi la kunvojaĝantojn el la infero.

Bedaŭrinde majoritate la mondanoj ne kredis je infero, simple ĉar ili ankaŭ ne kredis je paradizo. Infero ekzistas, diris kelkaj mondanoj. Ne estas infero, argumentis aliaj. La saman diskuton oni faris pri paradizo. Vi povas imagi la malfacilon atingi la taskon kiun ili asignis al si.

Dum la konfuzo daŭris, venis Aspiruloj, kiuj estis la mesaĝantoj de la bono. Ili per ilustraĵoj anoncis la ekon de la ora mondo, pli bela mondo, kie oni kolektos oron kaj eblos eĉ malkovri diamantojn se oni fosos enen. Mondo kie ne estos malsato nek mizero, mondo kie ĉiuj havos egalajn ŝancojn je la vivo, la edukado kaj la prospero. Unu kondiĉo por eniri tiun oran mondon, tiun ontan mondon, estis havi oran ŝlosilon por la nura pordo aŭ enirejo al ĝi. Onidire, neniu egoisto povus eniri tien.

Enirus nur homoj kiuj scias kundividi aŭ kunĝui la bonon kun aliaj. Tiu kiu trovas la ŝlosilon devus pretiĝi doni ĝin ankaŭ al aliulo kaj neniam kontraŭpage. Laŭdire temis pri magia ŝlosilo kiu povus malaperi se oni ne zorgas pri ĝi. Tiel estis je la komenco, kaj des pli ĝi efikis, ju pli oni ĝin konservis bone. Tial ĝi povis kvazaŭ aŭtomate malfermi la pordojn al la onta mondo. Kiam oni ĝin donacas al aliulo, tiam ĝi fariĝas granda, kaj baldaŭ grandega. Tiun ŝlosilon kelkaj nomas “amo”, aliaj “bono”. Temas pri valoroj interkontinentaj, kiuj rolas kiel malfermilo, senodora, senracia, ĉieeniranta kaj eterne bonega. Bedaŭrinde ne ĉiuj ĝin havis kaj ne ĉiu sukcesis ĝin trovi. Venis fraŭlino nomata Bestino kiu iam pensis kiel trovi ĝin. Ŝi kredis ke ŝi malkovris la sekreton kiel iri al la onta ora mondo. Ŝi pensis, ke la ŝlosilo ie kaŝiĝas en la oriento de D. R. Kongo. Kial en Kongo? Ŝi sciis, ke la atombombo kiu malbenis Hiroŝimon kaj Nagasakon venis el Kongo. Kie estas problemego, tie troviĝas la solvegoj.

***“Tiun ŝlosilon kelkaj nomas ‘amo’, aliaj ‘bono’. Temas pri valoroj interkontinentaj, kiuj rolas kiel malfermilo, senodora, senracia, ĉieeniranta kaj eterne bonega.”***

Bestino tiam vivis en Ruando, kaj decidis do iri al Kongo trovi ŝlosilon aŭ fabriki unu. Ŝi volis akiri ĝin por pli serioza misio: iri en la ontan mondon, trinki el la sankta rivero kaj vivi eterne en paco kaj ĝojo. Por trovi la ŝlosilon, Bestino irus laŭpense al la minejoj kie ŝi provus fosi por oro, diamantoj, kasiterito, koltano<sup>1</sup>, kupro ktp. La ideo estis iri tien kaj trovi mineralojn por fabriki oran ŝlosilon. Ŝi do vojaĝis al D. R. Kongo. Tuj post la alveno, ŝi uzis siajn manojn por labori kiel multaj infansoldatoj faradas tie. Ne sukcesinte, ŝi uzis aliajn metodojn, per sia mono dungis fortulojn por trui la valojn, la montojn; fosis preskaŭ ĉie por la oro kiun laŭplane ŝi uzus por krei oran ŝlosilon, bezonotan por malfermi la pordegon de la onta mondo. Sed vane! Bedaŭrinde por ŝi, la grundo estis sekega kaj malmola. Trovante nenion, ŝi rezignis kaj decidis foriri. Ŝi tamen sukcesis trovi kelkajn sakojn da kasiterito.

Tamen duonvoje, ŝi pensis pri la privilegioj kiujn la minejaj aferoj alportas. En kelkaj monatoj ŝi gajnis centoble kiom la registaro pagus al ŝi en la publikaj entreprenoj de multaj afrikaj landoj. Kial rezigni? Ŝi sciis ke nur la parlamentanoj en D. R. Kongo gajnas same centoble pli ol la civitanoj. Tie anstataŭ ol debati favore por la popolo kaj por forigi la mizeron el la teritorio, ilia plej ŝatata temo estas la akiro de novaj ajnagrundaj aŭtoj aŭ la propra salajraltigo. Bestino tuj decidis lui maŝinojn kaj dungi homojn kiuj laboros por ŝi, ŝtelos mineralojn, establos preskaŭ registaran sistemon ĉirkaŭ la minejoj, kie homoj pagas por komerco, vizo, impostoj, sed kvazaŭ ili metus la monon en truitan

1 La vorto “koltano” estas kunmeto de la nomoj de du maloftaj metaloj: “kolumbio” (malnova nomo de niobo) kaj “tantalo”. Koltano estas bezonata i.a. por produkti poŝtelefonojn.

D. R. Kongo, formiĝis por batali kontraŭ la alilandanoj kiuj volis ĉion regi, ĉion ŝteli, dum la loĝantaro estis mortigata kiel nevaloraĵoj. Majmajo provis agi por la indiĝenaj popoloj, sed kion ili povus fari kontraŭ la tuta kvazaŭĉina armeo dungita de Bestino? Tiu Bestino kiu unue ne havis sufiĉe da mono, tuj poste fariĝis riĉulino, la plej konata en la okcidenta mondo.

Homoj pensas, ke anstataŭ uzi nur siajn membrojn, siajn manojn, ŝi kiel en la junaĝo preferis uzi siajn sidvangojn tiel arigante multe da riĉaĵoj por si. Oni raportas ke ŝi mem respondecas pri la konstruado de tuta kvartalo nomata "dankon D. R. Kongo" en la mezo de Kigali. S-ro Rugabo iam informis la amaskomunikilojn ke Bestino estas hipokrita kaj venas el Ruando. Laŭ s-ro Rugabo, Bestino laboris en la armeo de Ruando nur por kelkaj monatoj kiel ŝoforino sed tuj kiam ŝi transiris la landlimon al Goma, ŝi libere sin deklaris *general*, tio estas generalino. La infansoldatoj laboris kaj sub ŝia regado kaj sub ŝiaj gluteoj. Iam oni raportis al ĵurnalistoj ke soldatoj de Ruando havas flug-robotojn, armilegojn, bombegojn kaj monon sed ne sukcesis venki la popolojn kiuj sin donis por defendi la landon. La popoloj defendantaj la landon tuj fariĝis majmajanoj. Kiam noktis, la majmajanoj kantis, dancis laŭ la maniero de Hutu Power aŭ Interahamwe, kiuj fuĝis el la venĝgenocido de Paŭlo Kagame kaj restis kiel bestoj en la ekvatora arbaro de Kongo.

Bestino iniciatis preĝon ĉiuvespere post la manĝo por opiumi la laborantojn. Ŝi tion faris miksante la spiriton de Dio al la spirito de la praavoj. Majmajo tamen havis alian avantaĝon, ili havis la plej efikan sorĉaĵon preparitan de Nalunyange, la tiama ĉefsorĉistino en la tuta regiono de vastaj lagoj. Ŝerce oni diris, ke por mortigi Majmajon, nur unu eblon oni havas, kaj tio estas meti ŝnuron ĉirkaŭ la kolon sur kiu estu fiksita ŝtonego, kaj forĵeti la ŝtonegon en la maron, tiel ke la ŝtonego altiros lin subakven.

### **FACILA: (Kvazaŭ-)abonado de BA tra UEA!**

**La libroservo de UEA pretas sendi al vi aŭtomate ĉiun novan numeron de *Beletra Almanako*, tuj kiam ĝi aperas.**

Vi devas okupiĝi nur pri du aferoj:

skribi unufoje retmesaĝon al [libroservo@co.uea.org](mailto:libroservo@co.uea.org)

kun la noto "**Konstanta mendo de BA**"

kaj havi sufiĉe da mono en via UEA-konto. Provu!

Mikaelo Bronŝtejn

**Eksorto tria: Talis**


---

 Ĉi tiu teksto estas la komenco de nova romano de M. Bronŝtejn.
 

---

1918

## I.

Mezmarta malpura neĝo ne rapidis forlasi la malkvietan Petrogradon; evidente, manko de ia ordo kaj certeco influis ankaŭ la veteron. Pli ol duonmetra tavolo, kiun abunde ornamis kotmakuloj, gazetpecoj, terpomŝeloj, ĉifonaro kaj alia rubo, dissemita surneĝe dum la longa frosta kaj malsata revolucia vintrego, kovris preskaŭ ĉiujn stratojn de la urbo, nur meze de la trotuaroj serpentumis paŝpadoj, produktitaj de mil-kaj-milpieda ĉiutaga iro. Mankis stratpurigistoj. Mankis provizo. Entute mankis certeco pri bonŝanca alveno de ia morgaŭo en la morna, malsata kaj malpura ĉefurbo de la nova Rusio.

Memkompreneble, la armeo fartis pli sate ol la ordinaraj civitanoj de la revolucia ĉefurbo. Tio, kion oni nun nomis armeo, estis Talis kaj kelkaj regimentoj de liaj sampatrujanoj – latvoj. La fuzilieraj regimentoj fakte estis la sola fidinda apogo de la bolŝevika<sup>1</sup> registaro kaj, konsciante la fakton, tiu registaro grandpene eltrovadis nutraĵojn kaj municion por siaj defendantoj. Tamen, malgraŭ la relativaj sateco kaj bonfarto Talis ne ŝatis sian restadon en Petrogrado. Ĝuste la 9a regimento de latvaj fuzilieroj, lia regimento, prizorgis la sekurecon de la registaro mem. La alternaj dekduhoraj vaĉadoj ĉe Smolnij<sup>2</sup>, se oni forgesu pri la fia vetero, estis nek tro klopodigaj, nek tro danĝeraj, sed Talis ne ŝatis ilin. La fronto estis pli konvena por lia agema lio, do li preferus miltservi en iu alia regimento el inter tiuj, kiuj batalis nun ie ne tro for de Petrogrado kontraŭ generalo Kornilov. Ĉiu ajn ŝanĝo de lia stato ŝajnis al Talis salutinda, kaj, kiam li ricevis subitan ordonon ekgardi certan trajnon en Nikolajevskij-stacidomo, lia lio estis kontentega kaj entuziasmiĝinta.

Ĉe la taga fino, ricevinte kartoĉojn, panon, haringojn kaj tabakon, Talis ordonis al sia roto enaŭtiĝi. Cent liaj subuloj aferece eniĝis la karo-seriojn de tri ŝarĝaŭtoj, kunpreninte kvin mitralojn, personan municion kaj provizon. Lia kolego, rotestro Smildzinŝ, restis kun sia roto por gardi Smolnij. Pliaj du rotoj de la regimento estis foririntaj pli frue – ili jam sukcesis senhomigi la konstante bruon stacidomon Nikolajevskij kaj disiĝis patrole, gardante la tutan konstruaĵon kun apuda teritorio kaj la trajnon startprete atendantan ĉe la kajo.

1 **bolŝeviko**: bolŝevisto; **bolŝevika**: bolŝevista, bolŝevisma.

2 Smolnij: petrograda palaco, servinta kiel stabejo de bolŝevikoj.





## Originala poezio ĉe Mondial Mendu ĉe UEA aŭ vizitu [librejo.com](http://librejo.com)!

**Baldur Ragnarsson:** En 2008, li komencis sian nun sesjaran kunlaboron kun nia eldonejo, kaj kontribuis ĝis nun per tri originalaj poemaroj kaj pluraj tradukoj el la islanda lingvo al Esperanto. Liaj poemaroj aperintaj ĉe Mondial:



En 2007 aperis ĉe Edistudio *La lingvo serena* kun ĉiuj ĝistiamaj poemoj kaj eseoj de Baldur Ragnarsson, kaj nur kelkajn monatojn poste Mondial jam povis publikigi tiujn ĉi novajn originalajn poemojn de la islanda verkisto, kreitajn en 2007 kaj 2008: **La neceso akceptebla**. ISBN 9781595690968; 116 p.

Okaze de sia 80a naskiĝtago, la islanda Esperanto-poeto mem pridonacis ŝatantojn de la originala Esperanto-literaturo – per tiu ĉi poemaro kun poemoj de 2008 ĝis 2010: **La fontoj nevideblaj**. ISBN 9781595691743; 128 p.





Ferenc Szilágyi iam skribis en *Norda Prismo* pri Ragnarsson: "... lin pelas la esploro de ĉio, kio kuŝas kaŝita en vi, en mi kaj en ĉiu homo de la unua historia balbuto. Lia literatura lerto ligiĝas al la islanda humo..." – Tiun gravan kvaliton de lia verkado vi certe retrovos en **laŭ neplanitaj padoj**, enhavanta poemojn verkitajn dum la jaroj 2011 kaj 2012. ISBN 9781595692566; 104 p.

Baldur Ragnarsson skribis, ke li vidas en la verkoj de **Jorge Camacho** "...novan ĝenron en la Esperanta poezio, kiun mi emas nomi 'organisma realismo'..."



"**Koploj kaj flandroj** estas la natura sekvo de *Eklipsas*. Se en ĉi poemkolekto nia poeto malkovris al ni aliajn vojojn kaj vibrigis nin per neaŭditaj tonaloj, nome starigis la bazon de nova poezia universo, en la libro, kiun vi havas enmane, li montras sin mastro de tia universo." (Miguel Fernández). ISBN 9781595691163; 152 p.

**La silika hakilo** entenas poemojn verkitajn de la hispana Esperanto-poeto en la jaro 2011, denove kun tiu "konciza kaj preciza vortuzo, kiu ofte mirigas per sia bilda dinamiko" (Ragnarsson). ISBN 9781595692269; 136 p.



Kun 320 paĝoj, **En la profundo** estas la plej ampleksa el la poemaroj de Camacho, kun poemoj verkitaj inter 2009 kaj 2013. "Mi kaptas la okazon diri al la ... publiko ion, kio devus jam esti evidenta: La verkaro de Jorge Camacho ... estas ne nur esperantuje, sed poetike atentinda." (Probal Daŝgupto). ISBN 9781595692597; 320 p.



Mao Zifu: **Kantoj de Anteo**. Unu el la plej mirigaj modernaj poemaroj. ISBN 9781595690449; 260 p.


Benoît Philippe: **Verse reversi**. "Simile al ... fotisto..., Philippe trafte prezentas ... momentbildon en nur kelkaj versoj." ISBN 9781595690975; 160 p.



Ulrich Becker: **Ĉiuj dioj estas for**. Impresoj de germano en Novjorko. ISBN 9781595690098; 104 p.



Originala poezio



Baldur Ragnarsson

**Baldur Ragnarsson**

## ***Kvar poemoj***

### **La rozo**

Turistoj  
svarmas sur la stratoj  
eltrovis Islandon

Fremdaj lingvoj  
ne rekoneblaj en la kaoso  
flirte tuŝas miajn orelojn

Ekster la montrofenestro  
de malnovaj Esperanto-libroj  
burĝonas nova rozo

### **Ĉu venis la tempo?**

Pasis la tagoj  
kiam la matenoj salutis min  
per vortoj pretaj por poemoj

Pasis tiuj matenoj  
kiam la korvoj de Odino vizitis min  
portis al mi energion  
portis al mi memfidon  
portis al mi ambicion

Ĉu jam venis la tempo  
ke mi sekvu ilin al Valhalo  
por renkonti ilian Mastron?

### **La magia ŝtono**

Junia nokto  
feaj paroloj inter la verdoj  
flustras sekretojn

Oraj radioj  
ripozas sur la supraj rokoj  
de la transgolfaj montoj

Maldensa nebulo  
vualas la bordon  
kie kuŝas la magia ŝtono

### **Salrezistaj herboj**

Gardu viajn paŝojn  
sur la algokovritaj ŝtonoj  
apud la lumtura roko

Gardu viajn paŝojn  
dum vi grimpas la vertikalon  
ĝis la ruinaĵoj

Salrezistaj herboj  
sub la soklo bonvenigos vin  
al refortiga ripozo

Gerrit Berveling

*Kvar poemoj***Kato ne duŝas sin**

---

*por Marjorie 90jara*

---

La kato ekiras ĉasisto revenas predisto miaŭa  
 fiero singlora la kat' kapkareasas  
 stulta best' min ordonas  
 Ekstere vintriĝas  
 varmkarese subduŝe mi iĝas humida  
 ne amas pluvadon surkape  
 sed ĉapo super la kap' (vi pensu pri Paŭlo!  
 mi ne estas virino, potencon superkape  
 ne akceptas, anĝelojn neniam delogas)  
 kapuĉo ankoraŭ pli teruras  
 do humile humidiĝas  
 Duŝante min mi pensas pri l' kato  
 ekstere vaganta:  
 li ĉasas anasojn, ĉaskaptas perdrikon,  
 galinolon neniam malŝatas (la kato  
 analfabete kondutas, eĉ  
 Paŭlon ne legas, nek dubas ĉu Paŭlo  
 intencis veganismon<sup>1)</sup>) ĉasinstinkto lin pelas:  
 la kato orgojla eĉ neĝon glacieron  
 sur kanaloj, glacipluvon surstrate,  
 tutan frostintan kontinenton  
 eĉ Atlantidon subiĝantan ne timas  
 nur ĉasas kaj ĉasas kaj ĉas ja la kato  
 dum subduŝe mi toleras eltene  
 la pluvadon  
 plu

---

1 **vegano:** ano de veganismo, t.e. filozofio kaj vivmaniero provantaj eviti ajnajn formojn de ekspluato kaj krueleco al bestoj por manĝaĵoj, vestoj kaj aliaj uzoj kaj produktoj.

**Pri mirakloj**

Atendvice ĉe trafiklum' ĉi-matene  
 rigardante la ŝoviĝantan reklamaĵon  
 (pretas por vi nia nova aŭtomobilo,  
 kia miraklo de tekniko – ne maltrafu ĝin!)  
 mi miris kiom do pravis  
 Heraklito [ĉio moviĝas, nenio stabilas]  
 jam antaŭ tiom  
 da jarcentoj – kia miraklo  
 de pensado!

– Sed ho, kiu lin afiŝas?

**Odo al Kerry**


---

*Usono neniam pro nura  
 pufigita ŝajnkialo invadus...*

---

Mi instruadis dekojn da jaroj pri  
 sci' historia, sed ĉu liveras ĝi  
     al vi, amiko, mondpercepton  
     pli realisman ol havas Kerry?

Ĉi tiu tele-oratoradis, ke  
 invadus ŝtaton ŝtato neniam ja  
     sur baz' de nura pufigita  
     ŝajnopravigo sen vera fundo.

Sed supozeble pri l' historia hor'  
 maldiligente maltrato atentis li:  
     la instruisto el pasint' nur  
     prenis ekzemplojn, forgesis nunon.

Grenado plendas, ke ĝi proksimas tro  
 al lim' Usona por sen perforto plu  
     ekzisti povi sen invado.  
     Konas neniu jam ties kaŭzon.


Ĉilion ĉu Usono invadis, ho  
 aserti tion kiu kuraĝus? Pri  
     la drogŝakrado en Panamo:  
     ĉu Noriega'n Uson' perfidis?

firme lokitaj sur marmoraj kolonoj... Tretado kaj trumpetado. Tintado kaj tintinado. Firma fondaĵo. Fiksaj fundamentoj. Marŝo de miriadoj. Konfuzo kaj kaoso tretata al la grundo. Sed ĉi urbo, al kiu ni vojaĝas, havas nek ŝtonojn nek marmoron; rezistas daŭre; staras neŝanceble; neniu vizaĝo, neniu flago salutas nek bonvenigas. Do lasu vian esperon neniigi; velku en dezerto mia ĝojo; pluiru nuda. La kolonoj nudas, bonaŭguraj al neniu, ĵetante neniun ombron, brilaj, severaj. Do mi retretas, ne plu fervora, dezirante nur foriri, trovi la straton, noti la konstruaĵojn, saluti la pomvendistinojn, diri al la servistino, kiu malfermas la pordon: Kia stelplena nokto.

‘Bonan nokton, bonan nokton. Ĉu vi iros ĉi tien?’

‘Bedaŭrinde ne. Mi iros tien.’

### Reklamo



## Marina

Originala romano de  
**Sten Johansson**

ISBN 9781595692719  
187 paĝoj; 8.5" × 5.5"  
(21,5 cm × 14 cm)

Marina kaj Tomas: du svedoj kun malsamaj originoj, kun sortoj malsamaj, kies padoj jen krucas sin jen malkuniĝas. Neatenditaj eventoj kaj revelacioj formas ilian rilaton, ĝis Marina malaperas – kaj eĉ poste.

**Mendu ĉe UEA, via libroservo aŭ ĉe [librejo.com](http://librejo.com)!**

Tradukita poezio



Kazimierz Bein



Rosmarí Torrens

**Poemoj**

El la hispana tradukis Miguel Fernández

La poetino Rosmarí Torrens Guerrini naskiĝis en Barcelono, en 1969. Ŝi estas oficiala instruisto ĉe la Barcelona Universitato, licenciito pri itala filologio kaj doktoro pri ĝenerala lingvistiko ĉe la sama universitato. Ŝi fakas pri la itala lingvo, lingvistiko, didaktiko pri fremdaj lingvoj kaj pri la studo de la etnolingva identeco de la italoj loĝantaj en Katalunio. Aŭtorino de pluraj publikaĵoj pri esplorado, ŝi ĵus ricevis la premion Lupa d'Or (Or-lupeo) de la Instituto de Katalunaj Studoj por la plej bona libro pri soci-lingvistiko en 2011.

*Cuando el arco está tensado* (Kiam la arko estas streĉita), ŝia unua poemaro, kunigas nur kelkajn el la sennombraj hispanlingvaj poemoj de ŝi verkitaĵoj en la lastaj dudek jaroj. La tri esperantigitaj poemoj, kiujn ĉi tie ni prezentas, apartenas al tiu kolekto. Pro ia elano, la kataluna poetino komencis reciti sian verkaron, kaj nur la entuziasmo de la publiko instigis ŝin publikigi tiun unuan libron.

Rosmarí Torrens kombinas sian poezian produktadon kun sia dediĉo al pentr-arto kaj al parola rakontado. Regule ŝi deklamas siajn poemojn en pluraj barcelonaj aŭditorioj kaj prezentas parolajn rakontojn kiel membro de grupo, kiu praktikas tiun agadon. Ambaŭ okupoj ebligas al ŝi montri sian amon al scenaj artoj, parolo, muziko, rekta komunikado kun la publiko kaj, ĝenerale, al interkonekto de diversaj artaj esprimformoj.

**Konfetoj**

Mia koro vibras  
 kiel lameno el metalo  
 viola kaj okra.  
 Siblas, resonas ene de la kavoj viakorpaj.  
 Poste la sono leviĝas,  
 serĉas sian liberon,  
 disŝutiĝas en konfetojn plurkolorajn  
 kaj vanuas ale al la futuro.


**Per lunoj kaj pikiloj, kaj fiŝoj**

Per lunoj kaj pikiloj  
 kovrita vi aperas, virin',  
 kaj per fiŝoj,  
 en la nokto,  
 sub lumo-triangulo.

**Béla Markó**

## ***Du poemoj***

Béla Markó (1951) estas Rumania hungarlingva poeto, senatano, eksredaktoro, eksprezidanto de RMDSZ / UDMR (Unuiĝo Demokratia Hungara en Rumanio), eksvic-ĉefministro de la Rumania registaro, sed ĉefe kaj antaŭ ĉio poeto, tre bona poeto, unu el la plej elstaraj hungarlingvaj poetoj nuntempaj.



---

Fonto: *Vikipedio*.  
Fotis/alŝutis: Vadaro (2010)

---

*El la hungara tradukis Jozefo E. Nagy*

### **Arto poetika**

Kun konstanta ekscitiĝo mi atendas,  
ke mia mano dronu en la ondantaj liniojn,  
ke ĝi reaperadu sufokiĝante  
kaj fine mergiĝu por ĉiam,  
ke mian korpon enfermu iu frazo  
kaj kuntrenu ĝin foren,  
senvestiĝante mi pretiĝas,  
ke ĉirkaŭprenu min la vortoj  
kaj, kiel tondilon en kunkudrita vundo,  
ili forgesu min en iu poemo,  
sed ĉio estas preto, tuto, brilo,  
kaj mi malame rigardas la poemon,  
kiel kuracitan malsanulon la tranĉilo.

Uĉimura Kanzoo / 内村鑑三

## *Spros' en frosto*

Uĉimura Kanzoo ĉirkaŭ 1918



Fonto: *Wikipedia*.  
Fotinto: Nekonata

Uĉimura Kanzoo: *Spros' en frosto*

*El la japana tradukis Nitta Takamichi*

Sur printempa branĉ' estas floroj,  
sur somera branĉo folioj,  
sur autuna branĉ' estas fruktoj,  
sur vintra branĉo – konsol'.

Post ol falas floroj,  
post ol falas folioj,  
post ol falas fruktoj,  
aperas surbranĉe spros'.

Aj, homo splena,  
oj, homo mizera,  
aj, homo perdinta esperon,  
proksimas printempa sun'.

Sur printempa branĉ' estas floroj,  
sur somera branĉo folioj,  
sur autuna branĉ' estas fruktoj,  
sur vintra branĉo – konsol'.

Artikoloj kaj eseoj



Marjorie Boulton

**Paul Gubbins**

## **Marjorie Boulton 90-jara**

Festis la 90-jariĝon de Marjorie Boulton trideko da homoj ĉe la kolegio de la Universitato de Oksfordo, kie en 1940 ekstudis la dojeno de la esperanta literaturo kaj poste, en la 1970aj jaroj, doktoriĝis.

Ĉeestis la ceremonion la 22an de majo ĉe Somerville-kolegio britaj kaj eksterlandaj esperantistoj, i.a. Brian Moon, vic-prezidanto de la Akademio de Esperanto, kiu transdonis salutmesaĝon nome de la Akademio al unu el ties plej longe servantaj membroj.

Dulingve, esperante kaj angle, realiĝis la festo, kompleze al neesperantistaj anoj de la kolegio, kiuj ĉeestis por honori unu el siaj plej renomaj studintoj.

D-ro Paul Gubbins, prezidanto de Esperanto-Asocio de Britio, skizis la multajn atingaĵojn de Boulton. Atentiginte pri ŝia instruista talento, li turnis sin al ŝia verkado, nomante ŝin la plej eminenta esperanta poeto vivanta, kies poezio direktiĝas ne al aliaj poetoj kaj literaturo-amantoj sed al ordinara legantoj. Tial, diris Gubbins, ŝi estas sendube la plej amata esperantisto – kaj ne nur pro siaj poemoj, tra kiu trabrilas profunda kunsento kun la homa sorto, kaj samtempe ofte humuro, sed ankaŭ pro sia vasta, ampleksa korespondado, per kiu ŝi kaptis la korojn de esperantistoj tutmonde.

Spekteblis filmitaj salutmesaĝoj i.a. de Humphrey Tonkin kaj Christer Kiselman, kaj en dialogo kun d-ro Geoffrey Greatrex, kiu aranĝis la feston, la festato parolis pri siaj studentaj jaroj ĉe Somerville.

Sekvis bufedo, kun festkuko, kaj kantata estis "Feliĉan Datrevenon". Dume estis ekspoziciataj libroj de Boulton el la kolegia biblioteko. La eventon mecenatis kaj la kolegio kaj Esperanto-Asocio de Britio.

Estu flanke notite, ke hazarde, kvazaŭ datrevena donaco, estas reeldonitaj de Routledge anglalingvaj tekstoj de Boulton, kelkaj verkita en la 1950aj jaroj, en la serio *The Anatomy of...*, ekzemple *The Anatomy of Prose*, *The Anatomy of Poetry*. Jen atestaĵo pri la kvalito de la klereco de tiu ĉi plej eminenta, plej ŝatata homo, kiu nun eniras kun la bondeziroj de la esperanta komunumo sian dekan jardekon.

Humphrey Tonkin

## Marjorie Boulton, poeto kore fajra

Kiam homoj ekscias, ke la internacia lingvo Esperanto estas uzata kaj parolata de tutmonda komunumo kaj ke la lingvo daŭre floras kaj ekspansias, ili tamen surpriziĝas kiam ili eltrovas, ke la lingvo posedas konsiderindan literaturon. Kiamaniere (ili demandas) lingvo artefarita povus porti kun si semantikan riĉecon similan al tiu portita de etna lingvo uzata tra multaj generacioj? Kiel envenus ies menson la ideo verki en tiu lingvo kiam homo povus verki en sia gepatra lingvo? Kaj se tamen homo verkus en Esperanto, kial tiu homo entute atendus trovi legataron kiam la eventualaj legantoj povus legi pli facile en la lingvoj, kiujn ili konas denaske?

Jen la misteroj de la Esperanto-literaturo.

Unu kialo de verkado en Esperanto povus esti, ke la Esperanta libromerkato, aŭ la tutmonda Esperanta legantaro, pligrandus ol tiu de la lingvo de la verkanto. Estas ja tute eble, ke Baldur Ragnarsson, kies denaska lingvo estas la islanda kaj kiu estas inter la plej bone konataj Esperanto-verkistoj, povus trovi pli grandan legataron de sia poezio en Esperanto ol en la islanda. Povus esti, ke aŭtoroj el Estonio, aŭ Albanio, aŭ eĉ Hungario povus atingi pli vastan *diversecon* de legantoj per verkado en Esperanto ol per verkado en la propraj lingvoj.

Sed se tia situacio ekzistas por la islanda aŭ la estona, ĝi certe ne aplikiĝas al la angla. Kiel klarigi, ke daŭre tiel multaj gravaj verkistoj en Esperanto devenis el Britio? Dum Kálmán Kalocsay, el Hungario, estis, inter multaj legantoj kaj tra multaj jaroj, rigardata kiel la plej granda Esperanto-poeto, estas pli malfacile klarigi, ke lia literatura posteulo, William Auld, eble eĉ pli kapabla poeto, elektis Esperanton havante la anglan kiel sian unuan lingvon. Li estis unu el kvar britaj poetoj kiuj en la 1950aj jaroj aperigis kvaraŭtoran kolekton de originala poezio en Esperanto (*Kvaropo*, 1952). Preskaŭ tuj poste, en 1955, venis granda kaj flua volumo de alia brita poeto, Marjorie Boulton (*Kontralte*, 1955). *La infana raso*, de Auld, sekvis en 1956. Eksterordinaraj jaroj!

Marjorie Boulton naskiĝis en 1924 en Teddington en la provinco Middlesex, tuj apud Londono, en senpretenda familio, sed ŝi kreskis ĉefe en norda Anglio, kien la familio baldaŭ migris. Studema kaj impresiĝema knabino, sola infano, kiu vaste legis kaj komencis verki ekde frua aĝo, ŝi venis sub la pozitivan influon de lerta instruisto de la angla literaturo, kiu helpis ŝin kandidatiĝi por eniro en la Kolegion Somerville, en la Oksforda Universitato, tiutempe unu el tri virinaj kolegioj en la universitato. La Kolegio donis al ŝi malavaran stipendion. En Oksfordo, vera kolono de privilegio, kiu tiutempe nur paŝete ekmalfermis sin al tiuj, al kiuj

## TRAGIKOMEDIO

Ululis strigo ... Juna edzo mortis.  
Vidvino ĉarma dronis en funebro...  
Cindrigi la kadavron oni portis,  
dum sin al lito ligis sven' kaj febro.

La cindron en orvazon oni metis,  
(Orvazo kun nom' kaj flata moto)  
sed la lakeo sur la strat' faletis;  
la karan cindron glutis akva koto.

Nun kion fari?! Lin eĉ spir' forlasis.  
Ĉe stratangul' proponis sin la savo:  
la kesto balaaĵa ... Li alpaŝis,  
"En, cindroj ŝamas" - ĉerpis el enhavo.

Ĉe l' urno, ĉe altaro kandelluma,  
vidvin' korsire plendas al ĉieloĵ:  
"Por mi el vi, ho, restis, edzo juna,  
jen cindro nur kun - paro da ovŝeloĵ!"

Jen mia kontribuaĵo al la "etoso" de la  
geamika tablo en Ĉluny. Kaj nun, kara  
amiko kaj kolego, jam antaŭe mi esprimas  
koran dankon ~~por~~ via nova infano "La ĝoĵa  
podio" Tute certe ĝi forpelos, almenaŭ  
por momentoj, la amaran humoron, se ĝi  
efektive atingos min. Tial mi petas vin  
sendu ĝin rekomendita. Ĉio alia deziro  
ja estus vana pro la alta dogano. Tamen  
dankon pro via amika bonvolo. Akceptu  
saluton por vi, por vāj samhejmoĵ kaj  
~~per~~ la geamikoĵ, eble rememorantaj anko-  
raŭ pri la migranta bardo via:

*Julio Zaglay*

Al Francine, la filino de Raymond Schwartz, mi ŝuldas dankojn pro ŝia permeso ĉerpi versaĵojn de ŝia patro en la *Ora Libro de la Tri Koboldoj*, espereble ankaŭ por la plezuro de la legantoĵ de *Beletra Almanako*.

taksas realaĵojn. Jen la impeto de la homa deziro. Tiu strebo, tiu kapablo krei, kaj la kapablo fosadi analize al esenco de aferoj, tio, kio ebligas tiujn kapablojn, estas la vere sekreta miraklo.

## II

Ekzistas en la angla tradukoj de multegaj verkoj de Borges, eĉ pluraj tradukoj de samaj verkoj<sup>6</sup>. Ankaŭ en Esperanto ekzistas pluraj tradukoj, eĉ kelkfoje pli ol unu traduko de identaj verkoj. Oni trovos ilin dise en la gazetaro, sed nun haveblas la ampleksa kaj sola antologio en Esperanto, *La sekreta miraklo*<sup>7</sup>.

Sed nun mi resumu la temaron de Borges:

- i. Infinito kaj infinita divideblo
- ii. Paradokso de la duobligo de la kosmo en mikrokosmo
- iii. ... ofte kun rezulto de malstabiligo de la kosmo
- iv. Okazas konstante anksio pri infinita rikuro – divideblo, mult-obligo, aŭ respegulado
- v. Troveblas ofte talismana objekto de perfekteco kiu reprezentas aŭ instigas malstabiligon
- vi. Ekzotika manuskripto aŭ folkloro
- vii. La malebleco vivi konstante kun konscio de ĉiumomenta ŝanĝado
- viii. Malstabileco kuŝanta sub la iluzio de permanenteco
- ix. Okupiĝado pri la lingvo kaj pri persona identeco, juĝataj kiel iluziaj abstraktaĵoj, dissolvitaj laŭ ekstrema nominalismo
- x. Sento de taburompo, de honto, de blasfemo al la mondordo, sento kiun kaŭzas apero de malstabiligaj strukturoj, objektoj, speguloj, duobligoj...

6 Rimarkinda escepto estas *Nota Preliminar*, prefaco al hispana traduko de verko de William James, *Pragmatismo, un nuevo nombre para algunos viejos modos de pensar; conferencias de divulgación filosófica* (Pragmatismo, nova nomo por iuj malnovaj pensmanieroj; popolklerigaj prelegoj filozofiaj), traduko de Vicente P. Quintero (Buenos Aires: Emecé, 1945), p. 9-12. Ĝi estas raraĵo intence ne antologiata sed eble kerna en la pensaro de Borges, do mi enretigis ĝin ([autodidactproject.org/other/borges\\_11\\_notapreliminar.pdf](http://autodidactproject.org/other/borges_11_notapreliminar.pdf)). Ne ekzistas anglalingva traduko. Oni traduku ĝin al Esperanto.

7 Kompilis kaj redaktis István Ertl; tradukis el la hispana Jorge Camacho, Giulio Capa, Tomasz Chmielik, Fernando de Diego, Liven Dek, István Ertl, Higinio García, Kris Long, Gonçalo Neves, Joxemari Sarasua, Francisco Veuthey. Kalinigrad: Sezonoj, 2008. 200 p. Serio *Mondliteraturo*; Volumo 16. ([esperanto-ondo.ru/Borges.htm](http://esperanto-ondo.ru/Borges.htm)) La enhavtabelo troveblas en mia bibliografio (vd. noton 1), ligoj al enretigitaj verkoj kaj bibliografio de aliaj.



- xi. Forfuĝo de la hororo de la infinito al la ĉiutaga limohava mondo, eĉ ĝis malvolvo diskuti poste la sperton de la infinito
- xii. Nekaptebleco de ĉiuj momentoj, de plena memoro kaj identeco
- xiii. *Ars combinatoria* kaj ties limoj, nekategoriebleco de la kreivo<sup>8</sup>
- xiv. Hazardaj renkontoj
- xv. Fono de violento aŭ tragedio

*La sekreta miraklo* estas dividita laŭ prozo kaj poezio. Prozo inkluzivas kaj novelojn kaj eseojn. Ne ĉiam facilas diferencigi inter fikcio kaj nefikcio. Enestas eseismaj elementoj stilaj kaj enhavaj ankaŭ en la noveloj, kiuj plenplenas da erudicio aŭtentika kaj blaga, inventita, t.e. kun abundo de referencoj al neekzistantaj verkoj. Aliflanke, pluraj meditemaj nefikciaĵoj havas stilon de rakontoj. Mi ne certas pri la (ne)fikcia statuso de kelkaj verkoj, aparte tiuj el la antologio *El Hacedor* (La faristo). *La faristo* mem ne mencias sed aludas Homeron. Aliaj verkoj kiuj eble estas nefikciaj estas *La kaptito*, *Delia Elena San Marco*, kaj *La atestanto*. Fikciaĵoj mi taksas *Ragnarok*, ankaŭ *La evangelio laŭ Marko* (devenan el alia novelkolekto). Krom la jam menciitaj, enestas ok nefikciaĵoj, inkluzive de la famaj *La analiza lingvo de John Wilkins* kaj *Borges kaj mi*.

*La sekreta miraklo* enhavas la ĉefverkojn *La alefo* kaj *Pierre Menard*. Krom ĉiuj jam menciitaj verkoj, enestas 15 noveloj, inkluzive de la majstroverkoj *Tlön, Uqbar, Orbis Tertius*; *La loterio en Babilono*; *La biblioteko de Babelo*; *La ĝardeno de la disdiiĝaj padoj*; *Funes, la memoroza*; *La morto kaj la kompasoj*; *La sekreta miraklo*; *Tri versioj de Judaso*, kaj *La Sudo*.

Enestas 14 poemoj. Kiujn menciis? Por mi la plej imponaj kaj plej belaj estas *Poemo pri la donacoj*, *Arto poezia*, *La forano*, *Laŭdo de ombro*. Mi aldonas *Pluvo* pro lirikeco, kaj *Al la unua poeto hungara* pro la graveco de tiu lando en nia beletro.

Mankas en ĉi tiu antologio sed troveblas *Interrete*, interalie, la elstaraj noveloj *La senmortulo*, *La cirklaĵoj* kaj *La libro el sablo*. Troveblas *Interrete* kelkaj poemoj; notinde estas, ke, el la du poemoj pri filozofo Baruh Spinoza, haveblas *Spinozo*.

**“Mirakle Borges neniam elĉerpis la eblajojn de sia favorata temaro. Ankaŭ en lia lasta novelaro La raporto de Brodie enestas majstroverkoj.”**

8 Ĉi tiu temo “arto de kombinoj” troveblas malkaŝe kaj kaŝe en multaj verkoj de Borges, kaj la implicaĵoj ne estas tiom evidentaj kiel aliaj temoj. Laŭeble konsultu miajn analizojn de *La alefo* kaj *Pierre Menard*, ankaŭ *Borges Ironizing Idealism*.

Estas tiom multaj bonegaj verkoj de Borges, malfacilus prioritatigi la ceterajn. Mirakle Borges neniam elĉerpis la eblaĵojn de sia favorata temaro. Ankaŭ en lia lasta novelaro *La raporto de Brodie* enestas majstroverkoj. Se mi esperantigus nur unu el ili, kiun mi elektu? Eble la librotitolan novelon, aŭ *La memoro de Shakespeare* aŭ *Bluaj tigroj*.

Pri la eseoj, plej bedaŭrinde la manko de du en Esperanto. *Avataroj de la testudo* ilustras la ĉefajn temojn, per fokuso je la paradokso de Zenono kaj infinita rikuro. Sed sendube la plej serioza manko estas *Nova refuto de la tempo* (1947). Ĉi tiu eseo ŝlosilas al la Borgesa mondrigardo. En ĝi Borges konfesas, ke lia argumento konsistigas *reductio ad absurdum* (redukto al absurdo), kaj li konkludas “La mondo, bedaŭrinde, estas reala; mi, bedaŭrinde, estas Borges”.

Eĉ se verkoj de Borges traduke abundas en via nacia lingvo, nepre frandu Borges en Esperanto. Ĉi-cele *La sekreta miraklo* estas nemalhavebla. Borges kaj mi kaj vi — ni revas tro<sup>9</sup>.

9 *Mi revas tro* (I Dream Too Much) estas titolo de fama kanzono de Jerome Kern. Inspiris min versio ludita ĉe koncerto de avangardjaza “Arkestro” de Sun Ra.

## Reklamo

**Probal Dasgupta:**


**Loĝi en homaj lingvoj: la substancisma perspektivo**

Mondial, Novjorko (librejo.com), 244 paĝoj. ISBN 9781595692146.

Lingvistika/filozofia monografio, rekomandanta i.a., ke la filozofoj uzu Esperanton kiel koncepto-klarigan lingvon. Ideojn el la tradukistiko, la genera lingvistiko kaj la poststrukturisma literatura teorio Dasgupta amuze kunkuiras por surtabligi verdan gulaŝon. La pladojn interpunkcias ĉapitrofinaj babilsesietoj; ankaŭ leganto fremda al la fakaj konoj ĝuos tiun ĉi rakontecan verkon.

“Ĵus eklegis la unuan ĉapitron; jam estas klare, ke la teksto montriĝos ne nur analize, sed ankaŭ distre sukcesa.”

*Noam Chomsky*



Originala teatro



Kálmán Kalocsay

**Rikardo Cash**

## ***La grandioza kongreso***

*Movada farseto*

### **Resumo**

Ni estas en “tipa” kongreso. En serio de scenetoj, nia Unuafoja Kongresano renkontos malsamajn kongrestipulojn. Bonvolu ridi... speciale se vi rekonos vin mem!

### **Roluloj**

**Unuafoja Kongresano** (naivmiena persono)

**Veterana Kongresano**

**Organizanto**

**Giĉetisto**

**Movadano**

**Libroservisto**

**Poeto**

**Akademiano**

**Ekskursgvidisto**

### **Rimarko**

Mi verkis ĉi tiun teatraĵon por du virinoj (Christine Vidotto kaj Samia Harir, de la Tuluza Teatra Trupo). Samia ludis la Unuafojan Kongresanon, kaj Christine ĉiujn aliajn rolulojn. Ĉi tiu roldistribuo ŝajnas al mi en adekvateco kun la farsa etoso de la teatraĵo.

Sed oni povas aranĝi la distribuon malsame. Ĉiuj roloj povas esti ludataj indifere de viro aŭ virino. Tamen la Unuafoja Kongresano devas esti ludata de la sama persono en ĉiuj scenetoj, dum la aliaj roloj estas distribueblaj laŭ la bontrovo kaj ebloj de la trupo.

Inter la scenetoj oni povas fari ian distraĵeton (ekz-e ludi *La Himnon* aŭ alian muzikaĵon), por ke la persono kiu ludas la aliajn kongresulojn havu tempon por ŝanĝi kostumon. Sed tio devas tamen okazi rapide, por ne bridi la ritmon. Sufiĉas nur simbola rapide metebla kromvesto, kiel veŝto, ĉapo, okulvitroj, ktp.

Notu ke indikoj *dekstre* kaj *maldekstre* indikas la vidpunkton de la spektantoj.

## Scenejo

Centre situas malgranda tablo (en ĉiu sceneto ĝi estos siavice ĝiĉeto, katedro, ktp.), kun seĝo. Iom fone, tabulo kun afiŝo *POSTAĴOJ* (sen ĉapelo sur S!).

### 1. La unuafoja kongresano

*(Komence, la scenejo estas senhoma. Post kelkaj sekundoj, la Unuafoja Kongresano malrapide alpaŝas de dekstre, rigardante ĉiudirekte kun levita kapo, kvazaŭ turisto en katedralo. Li estas normale vestita, kun malgranda verda stelo sur la brusto. Li atingas la scenejcentron kaj turnas sin al la publiko.)*

**Unuafoja Kongresano** (*kortuŝite*). Jen.... Mia unua kongreso.

*(Li metas la dekstran manon sur la bruston, kvazaŭ por reteni sian koron.)* Mi lernas esperanton de du jaroj, sed nur nun mi povis veni al kongreso.

*(Li skuetas sian kapon, kvazaŭ por reveni al la reala mondo.)* Mi ŝparis monon, ĉesis fumi, ĉesis drinki, preskaŭ ĉesis vivi, por povi veni al ĉi tiu kongreso!

Eĉ mia koramikino minacis forlasi min, ĉar mi ne plu okupiĝis pri ŝi. Sed nenia ofero estas tro granda por realigi la sanktan pilgrimadon al kongreso!

Ĉar vidu, ĉu ne ke doktoro Zamenhof kreis esperanton por proksimigi la popolojn, por iel pace unuigi la homaron, por ke la homoj pli facile trovi sian vojon?

*(Li mienas iom perplekse.)* Sed estas nur unu problemo.... Mi estas komplete perdita!

### 2. La veterana kongresano

*(La Veterana Kongresano aperas maldekstre. Li portas jakon kaj ĉapelon kun multaj grandaj steloj kaj insignoj. Li firme sed trankvile paŝas dekstren. Atinginte la Unuafojan Kongresanon, li haltas.)*

*(Bonhumore.)* He, saluton, samideano!

**Unuafoja Kongresano** (*volas diri "Bonan tagon!", sed nur balbutas.*) B-b-b-b-....

**Veterana Kongresano** (*kompreneme*) Ho, estas via unua kongreso, ĉu? Vi estas kongresa virgulo! Ne estu nervoza! Respiru! Parolu malrapide, klare, kaj elegante!

**Unuafoja Kongresano.** B-bonan tagon! Jes, estas mia unua kongreso. Pardonu min, mi serĉas la Akceptejon, mi petas.

**Veterana Kongresano** (*levas la ŝultrojn*) La Akceptejon? Mi ne scias.

**Unuafoja Kongresano.** Sed ĉu vi ne jam prenis viajn dokumentojn?

**Veterana Kongresano** (*fiere*) Ho, mi ne estas ordinara kongresano. Mi estas Dumviva Kongresa Abonanto, ĉar mi jam ĉeestis pli ol tridek Universalajn Kongresojn! Mi aŭtomate ricevas ĉiujn dokumentojn hejme, kaj mi ĉiam havas la saman kongresnumeron: sescent sesdek ses!

**Unuafoja Kongresano.** Sed mi devas trovi la Akceptejon, ĉar ĝi baldaŭ fermiĝos.

**Veterana Kongresano.** Mi bedaŭras, mi ne scias kie ĝi estas. Tio estas por la kongresa plebo. (*Li turnas sin dekstren por foriri.*) Kaj nun mi devas kuri, ĉar en salono Zamenhof tuj komenciĝos la plej grava kongresa kunveno, la Kunveno de la Verdsteluloj. Tie okazos konkurso pri stelnumero. Gajnos la kongresano kiu portas la plej grandan nombron da steloj! Kaj tiu certe estos mi! Do, ĝis!

*(La Veterana Kongresano rapidpaŝe foriras dekstren. La Unuafoja Kongresano postrigardas lin senkomprene.)*

### 3. La organizanto

*(La Unuafoja Kongresano daŭre rigardas ĉirkaŭ si, kun senespera mieno.)*

*(Organizanto aperas dekstre. Li portas normalajn vestojn, dikajn okulvitrojn, kaj havas grandan oran nomŝildon. En la brakoj li portas grandan stakon da paperaĉoj. Li trairas la scenejon maldekstren, rapidpaŝe, preskaŭ kurante. Li komencas preterpasi la Unuafojan Kongresanon, kva-zaŭ li ne vidas lin.)*

**Unuafoja Kongresano** (*alparolante lin*) Pardonu.

**(Organizanto faras ankoraŭ unu-du paŝojn.)**

**Unuafoja Kongresano** (*insiste*) Pardonu, mi petas!

**(Organizanto haltas kaj mienas malkontente. Li nerveze rigardas sian brakhorloĝon.)**

*(Incitite)* Kion vi volas!?! Mi estas okupita!

*(Li denove rigardas la brakhorloĝon.)* Ĉu vi ne vidas mian oran kongresŝildon? Mi estas organizanto, kaj tre, tre, tre okupita!

*(Li atente rigardas la Unuafojan Kongresanon.)* Cetere, kie estas via kongresŝildo? Ĉu vi estas kongresano?

**Unuafoja Kongresano** (*penteme*) Pardonu min, mi petas, sed ĝuste mi serĉas la Akceptejon, por preni miajn dokumentojn. Ĉu vi bonvolus diri al mi kie ĝi troviĝas?

**Organizanto** (*denove rigardas la horloĝon; malpacience fingromontras maldekstren.*) Ĝi estas tie.

**Unuafoja Kongresano.** Kie? Mi ne vidas ĝin....

Nikola Rašić


## ***Meti la tutan mondon en poemon, disbati la lingvon kaj tiam krei...***

*En la profundo*, de Jorge Camacho, eld. Mondial, Novjorko, 2013, 320 p., ISBN 9781595692597.

Mi fakte ne scias kiel oni recenzas poemaron. Sed mi probable scias kiel oni devas legi poezion tian: Per plene malfermitaj okuloj, per klara menso kaj spirito, per la koro, por banale metafore esprimi sin. Sed antaŭ ĉio legi kun emocio, sentante samtempe ĝian formon kaj ĝian mesaĝon. Poemoj estas lingvaj artaĵoj kaj oni devas trakti ilin kiel tiajn. Samkiel juveloj ili estas kaj metiaĵoj kaj artaĵoj. Oro kaj diamanto estas nur materialoj, dependas kiel oni uzas kaj aranĝas ilin. Sed foje ankaŭ simpla ŝtoneto aŭ peceto de vitro povas akiri valoron juvelan, se arte aranĝita. Kompreneble nur majstroj kapablas tion. Simile poezio postulas mastron kaj majstron, iun kiu mastras la lingvon kaj majstras je vortoj kaj iliaj valoroj, signifoj, pensoj, emocioj. Ĉar finfine, poeto konstruas per vortoj ordinaraj tiel ke la rezulto fine eksterordinaru, tiel ke fine kaj la lingvo kaj la leganto ricevu ion novan.

Poemoj devas impresi, prefere frapi vin ol petoli, prefere skui vin ol enluligi en la sekurecojn de la vivo kaj rutinaĵojn de lingvo kaj penso. Poemoj devas antaŭ ĉio ne banali, ili devas rompi ion en vi, malfermi pordon al io ĝis tiam ne vidita, ne vivita. Poemoj devas esti sinceraj kaj honestaj, ĉar ili estas animaj produktoj kaj ili celas trafi kaj enplekti la animon. Tial poemi kaj poeti portas enorman respondecon: pri la vortoj, sed ankaŭ pri la legantoj.

Tiel, do, mi legis la lastan poemaron de Jorge Camacho. Ĝi perturbis mian vivon, ĝi skuis miajn ideojn, ĝi ŝancelis miajn kredojn kaj konvinkojn. Ĝi invitis min repripensi ĉion: la vivon, la filozofion, la mediprotektadon, politikon, amon, sekson, miajn lingvajjn gustojn, kaj mian kaj vian Esperanton. Mi legis ĉiujn liajn librojn kaj plej multajn poemojn, klaras al mi la radikoj kiuj elkreskis en tiun ĉi arbon, sed tiu ĉi estas la dinamito kiu detruas ĉion kaj tamen rekonigas la poeton kiel tiun saman, kiu verkis la ceterajn versojn jam al ni konatigitajn.



Unue mi lernis ke:

poemo  
 estas kiel ovo;  
 se ĝi venas mem,  
 ellasu ĝin; se ne, do  
 tute ne gravas; sed,  
 se tamen fine ĝi  
 venos, prefere  
 demetu ĝin  
 ronda

(p. 5)

Kiel kompleta, kiel ilustra, kiel vera, kiel bela! Kaj kiel samtempe kaj poemeca kaj oveca!

Post tio la leganton atendas plia ducento da poemoj, ĉar tiu ĉi libro estas la plej ampleksa libro kamaĉa, preskaŭ kiel ĉiuj ceteraj liaj libroj kune. Li demetis ja grandan ovon ĉi-foje.

Malfacilas recenzi ion tian, ĉar ĉiu poemo povus meriti apartan recenzon, ĉiu poemo estas ja mondeto por si mem. Se foje malfacilas kompreni tiujn mondetojn, la aŭtoro helpas per diversaj glosoj. Ili rilatas ĉu al neordinaraj ĉu al nePIVaj vortoj, ĉar Camacho zorge flegas sian krudaĵon, la Esperantan lingvon. Li klare motivas diversajn neologismojn (ekz. bildingo = konstruaĵo) aŭ reuzon ĝian trovitan jam ĉe aliaj poetoj. Fine de la libro troviĝas ankaŭ eta glosaro, kun klarigoj. Siajn ideojn pri neologismoj li klarigas en la aldonita intervjuo siatempe donita al *Kontakto*: “*la vortojn mi ne proponas; mi simple uzas aŭ ekuzas ilin okaze de bezono, kio estas tute subjektiva kriterio, same valida kiel tiu de aliaj uzantoj de la lingvo.*” Kelkfoje li ankaŭ mesaĝas sian “lingvopolitikon” klare distanciĝante de la klubo de tiel nomataj “bonalingvistoj”, kiuj arogas al si foje la funkcion de lingva polico (opinio mia, eble ne kamaĉa) kaj proklamas krucmiliton al la uzantoj de neologismoj. Eble temas pri homoj kiuj ne legas poezion, sed certe pri ideologia postulo kiu neglektas la lingvon kiel tian.

Estas bona ekstraĵo havi tian intervjuon kun diversaj opinioj de la aŭtoro kaj sendube ankaŭ la eseon prikamaĉeskan de Probalo Daŝgupto (por tiuj kiuj povas sekvi kaj kompreni), sed mi ial preferus ilian foreston. Ili helpas kompreni la poeton, jes ja, tio eble utilas, sed povus malutili en alia senco. Nome, post kiam la poeto elkovas sian ovon, ĝi ne plu apartenas al li/ŝi. Ĉiu leganto rajtas, povas kaj devas interpreti ĝin laŭ sia kompreno, metante ĝin en sian idean kaj emocian mondon. Ne gravas kiu poemon verkis, ĝi estas afero kiu en la momento de legado apartenas al la leganto, la aŭtoro per siaj interpretoj estas simple superflua. Ofte ankaŭ la kritikistoj aŭ recenzantoj.



Eble mi estas iom ekstrema anarkisma<sup>1</sup> poranto de la absoluta liber-eco de poemo, eĉ de ĉiu vorto uzita: en la momento de uzo ĝi apartenas al la kreanto – nur li scias kion li celis kaj volis – sed poste en la komunika procezo ĝi transiras al la ricevantoj, kaj tiuj ja redifinas ĝin ene de siaj mensaj kaj spiritaĵaj mondoj. En tiu senco la lingvo ĉiumomente rekreiĝas kaj la poemoj refoje ekvivas ĉiumomente kiam legitaj: al la poeto apartenas nur la unua – ja decidega! – momento. Pri la cetero li certe kulpas, sed ne plu havas regon, li ne plu havas povon kaj influon... liaj poemoj vivas sian vivon en tiuj ekstraj dimensioj (ja eksterdimensiaj per si mem) de la universo: la lingvaj spacoj kaj ebenaĵoj de kreivo, fantazio. Poetoj povus prave diri pri malpoeziemuloj: Homoj sen fantazio serĉas rifuĝon en la realo.

Do, tute kruele por la poeto memo kaj narco (mia neologismo derivita de la radiko “narcismo”)<sup>2</sup> mi preferus poezikolekton sen aldonaj informoj pri la ideoj de la poeto. Se io tia jam enestas, tiam avertendas ke la interpreto de la poeto estas nur unu el la eblaj: tiukaze li havas statuson de unu el la legantoj, neniel privilegiita. Poemoj estas orfoj: ili ja havas naskintojn sed ne gepatrojn, poemoj estas ĉiesulinoj. Se ne, ili ne estas bonaj.

Nu, la poemoj de Camacho ja estas bonaj, kaj ni revenu al ili, kvankam mi ĵus preskaŭ senrajtigis la aŭtoron je ili. Tio en si mem estas tipa troigo recenzula por hiperboligi la signifon de la poema aŭtonomio, ĉar poemoj ja estas aferoj antaŭ ĉio personaj, kaj nur difinita homo, ĝuste tiu poeto, povis enmondigi ilin tiaj, neniu alia. Tial la aŭtoro ja gravas – lia ideo kaj lingva mondo finfine influas la tuton, li estas la unika generilo de tiu unika opuso,<sup>3</sup> de tipe aŭtoreska poezio, kaj ni estus blindaj se ni ne tuj rimarkus tion ankaŭ en tiu ĉi kolekto – ke ĝi estas tiom tipe kamaĉeska.

1 La aŭtoro preferas uzi la formojn “anarkisma”, “konstrukco”, “bildiva”, “post leginti” k.a. al la vortare resp. gramatike ĝustaj “anarkiisma”, “konstrukcio”, “bildigiva”, “leginte / post ol leginti” – Red.

2 Laŭ *PIV* la korekta formo devus esti *narcismo*, derivita el Narciso, la grekmita persono. Tamen multaj uzas la formon *narcismo*, verŝajne lingvointuicie por eviti la haplologion (dufoja “is”), sed ne ekzistas la radiko “narc-”. Persono estas *narca* aŭ *narceca*, kaj tiu fenomeno de malsaneca memadmira nomiga *narcismo*. *Narcismo* tiam signifus posedon de eco komuna kun persono nomata Narciso, ĝi do havus referencan valoron rilate al mitologio. La vorto ‘narca’ fakte ne estas neologismo sed “*enlogismo*”, ĝi jam ekzistas en la teksaĵo de la lingvo, nur necesis malkovri ĝin kiel apartan fibron. Ĝi fakte estas pli kruda sinonimo de “narcisa” aŭ “narciseca”; ne novkreaĵo, sed lingva malkovro. Pensu pri eblecoj de vortoj kiel “anarka” apud “anarkia” aŭ “anarkisma”. Tiaj malkovroj estas tipaj por la kamaĉa lingvouzo, li nudigas nian lingvon foje ĝis la skeletaj formoj. Tiel li instruas al ni kiel ekstrakti la vortojn “zaĝo” [vidaĵo] kaj “pejo” [loĝloko] el *pejzaĝo* (fakte malkovro Probala), radikon “viki-” el Vikipedio k.s. kaj ĝisnude rekonstruktas la radikon “amik-” (am-+ik-) por krei “umiko” kaj “umikino”.

3 **opuso**: verkaro; latinismo ne *PIVa* sed enkondukinda laŭ la 15a regulo. Ĝi povus havi pli vastan signifon ol “aro da verkoj” en la senco “fararo”, ekz. opuso de iu arkitekto.

Catherine Krause

## Ĉiu estas ia al iu

---

Ĉu mi malgrandas?, de Phillip Winterberg kaj Nadja Wichmann, trad. Alejandro Escobedo, eld. Createspace Independent Pub, 2013, 28 p., ISBN 9781493668014.

---

Jorge Camacho / Catherine Krause

Antaŭ ĉio la infanlibreto *Ĉu mi malgrandas?* de Phillip Winterberg kaj Nadja Wichmann estas belege ilustrita. Sed la teksto, tradukita de Alejandro Escobedo, estas la dua trezoro. La libro rakontas pri knabino kiu demandas diversajn bestojn, ĉu ŝi estas granda aŭ malgranda. Depende de la besto, ŝi ricevas variajn respondojn. La libro povas instrui al infano aŭ lingva lernanto variajn sinonimojn pri gradoj de grandeco

kaj malgrandeco. Ĝi ankaŭ instruas la pli gravan lecionon, ke ĉiu estas ia al iu sed ĉiu ankaŭ estas sufiĉa.

La libro disponeblas en pluraj lingvoj tiel ke fervora, monhava lingvo-lernanto povus kolekti ilin por lerni tiajn sinonimojn en pluraj lingvoj per tradukoj. Tio estas bonega strategio de la eldonistoj, ĉar ili komprenas ke tiaj lingvamantoj ekzistas. Pri la Esperanto-traduko, ĝi pli-malpli perfektas, sed ĝi uzas unu vorton, "liliputa", kiu ŝajnas tro komplika por infanoj. La vorto estas aludo al romano, kiun infanoj probable ne legis, do por ili perdos iom da elvoka efekto.



.....  
**beletraalmanako.com**  
.....

Reklamo

Felipe Albert Reyna

***Kaŝita lingvotrezoro en kajera vesto***


---

*Foreign languages, what they don't often tell you: A book about languages*, de Nicole Else, ilustrita de Lili Giloteaux (krom la kovrilo), eld. la aŭtorino, Sydney (Aŭstralio), 2009, 35 p., ISBN 9780980576603.

---

La titolo de ĉi tiu libro (angle: *Fremdaj lingvoj: tio, kion oni ne ofte rakontas. Libro pri lingvoj*) indikas ties ĉefan enhavon: ĝi rakontas maloftajn rakontojn pri (fremdaj) lingvoj.

La libro konsistas el kovrilo kaj enhavo.

La antaŭa kovrilo havas sur verda fono la titolon per nigraj literoj, parte en flavaj kadroj, supre; malsupre la nomon de la aŭtorino per flavaj literoj; kaj en la mezo koloran desegnon, sur blanka fono kun ruĝa kadro, de ses diverskoloraj, diversvestaj infanoj (kurioze: ĉiuj ĉapelitaj) manprenantaj ĉirkaŭ la mondo.

La malantaŭa kovrilo, ankaŭ sur verda fono kaj refoje kun parto de la titolo, montras en ruĝa kadro kun blanka fono tion, kion oni povas sciigi per la libro, la eblecon kontroli sian novan scion kaj informeton pri la aŭtorino.

La ĉefa enhavo estas enkonduko, dek kvin ĉapitroj aŭ legaĵoj kun tuj sekvaj demandoj (kun respondoj por elekti, ne nepre sin reciproke ekskludantaj), konkludo, informo pri la aŭtorino, respondoj al la demandoj kaj “Award of Excellence” (angle: “Atesto de Elstareco”).

Ĉiu parto estas en po unu paĝo (kompreneble, ĉiu ĉapitro aŭ legaĵo havas sian paĝon, kaj ĉiu serio da demandoj estas sur unu paĝo). Krome, ĉiu ĉapitro enhavas ankaŭ po unu nigra-blankan, simplan desegneton.

La titoloj de la ĉapitroj estas (en mia traduko):

- 1 Lingvoj de la mondo
- 2 Similaĵoj inter la lingvoj
- 3 Kiel diversas la lingvoj laŭ sia gramatiko
- 4 Kiel diversas la lingvoj laŭ sia alfabeto
- 5 Ĉina skribo
- 6 Japana skribo
- 7 Skribi nombrojn en diversaj lingvoj
- 8 Diversaj manieroj skribi la anglan
- 9 Fonetika kaj simpligita angla literumado
- 10 Lingvoj en Aŭstralio
- 11 Kial traduki estas tiel malfacile?
- 12 La bezono de komuna lingvo
- 13 Kial ne ĉiuj povas lerni la anglan?
- 14 Kio estas esperanto?
- 15 Kial esperanto estas tiel facile lernebla?

Kiel trovi do ekvilibron inter tiu sinteno kaj la tradicio de (tro)rim-itaj hajkoj originale verkitaj en Esperanto (unuavice fare de japanaj hajkistoj) – jen la defio. Eble oni ne senigu sin tute je la uzo de subtilaj rimedoj kiel vokalrimoj, asonancoj kaj aliteracioj.

**PS:** La legado de *KVH* instigis min verki la eseon *De hajko al hajko*. Ĝi kunricevis unuan premion en la Belartaj Konkursoj de UEA 2013 kaj rezulte publikiĝis en la libreto *Belarta rikolto 2013*<sup>3</sup> (p. 46-54). Al la tiea fina listo de cititaj (kaj citindaj) verkoj mi nun aldonus pliajn du: la eseon *Hajko kaj utao kiel originalaj poemoj*, de Kikunobu Matuba, en *Li kaj ni*<sup>4</sup> (p. 101-107), miaopinie vane pledantan ne por 17-silaba sed por 11-silaba “novhajko”; kaj la artikolon **HAJK-O** (p. 58-62) en la eksterordinara *Enciklopedieto japana*<sup>5</sup>, el kiu mi parte citu por fini ĉi recenzon la difinon de la koncepto “jugeno” (p. 74-75), nemencieble nemalhavebla hajk-elemento: “**JUGEN-A** : 1) mistere profunda kaj respektveka, precipe pri filozofia principo kaj religia doktrino, 2) Sublime eleganta pro simbola esprimo aŭ kompono en beletro, arto kaj dramo, precipe pri tankao kaj noo.”

- 3 *Belarta rikolto 2013. Premiitaj verkoj de la Belartaj Konkursoj de Universala Esperanto-Asocio*, diversaj aŭtoroj, eld. Mondial, Nov-Jorko, 2013, 91 p., ISBN 9781595692689. Recenzo fare de Valentin Melnikov aperis en *BAI9*, februaro 2014, p. 153-154.
- 4 *Li kaj ni. Festlibro por la 80a naskiĝtago de Gaston Waringhien*, diversaj aŭtoroj, eld. TK/Stafeto, Antverpeno/La Laguna, 1985, 520 p., ISBN 9063360347.
- 5 *Enciklopedieto japana*, de T. Nakamura, eld. Kosmo, Osaka, 1964, 217 p.

## Reklamo

### **Mil naŭcent okdek kvar**

de George Orwell. *Klasika angla soci-utopia romano*,  
tradukita de Donald Broadribb.

La mondo estas dividita inter tri superŝtatoj, kiuj konstante militas unu kontraŭ la alia. La romano rakontas la vivon de Winston Smith en Londono (en la ŝtato Oceanio), kiu ŝajnigas esti fidela membro de la ĉionreganta *Partio*, kaj lian vojon al ribelemo kaj sekreta am-afero, same kiel ties terurajn konsekvencojn...

288 paĝoj. ISBN 9781595692498

**Pli da informoj pri enhavo kaj la haveblo ĉe [librejo.com](http://librejo.com).**






# Beletra Almanako

N-ro 20 (Junio 2014) – 8a jaro

ISBN 9781595692801 / ISSN 1937-3325

## Erotika mondliteraturo

N  
O  
V  
A  
Ĉ  
E



M  
O  
N  
D  
I  
A  
L

**Telenio.** Romano, atribuita al **Oscar Wilde**. Tre eksplicita erotika romano, unue eldonita en Londono en 1893. Ĝi priskribas la pasian amaferon inter Kamilo Des Grieux, juna viro el familo de alta socia rango, kaj la hungara pianisto Reneo Telenio, en la fino de la 19a jarcento en Londono. Tradukis **Detlef Karthaus**.

MENDU ĈE UEA, VIA LIBROSERVO AŬ ĈE **LIBREJO.COM**.

[www.beletraalmanako.com](http://www.beletraalmanako.com)

**Redakteja ret-adreso:**

[redaktejo@gmail.com](mailto:redaktejo@gmail.com)

ISBN 978-1-59569-280-1



9 781595 692801

**MONDIAL NOVJORKO**

[www.librejo.com](http://www.librejo.com)